

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2011:2

Semajnfina kurso en Malmö

Vanliga frågor om Esperanto

Vad är esperanto?

Esperanto är kommunikation människor emellan. Världen blir alltmer internationell. Personer, pengar och varor rör sig mer och mer fritt. Men eftersom alla talar olika språk, som är svåra att lära sig, kan tankarna inte röra sig fritt. Esperanto är en lösning som kan överbrygga språkliga barriärer. Att lära sig esperanto är att säga "Jag är öppen för världen!"

Hur många människor i världen kan esperanto?

Tillräckligt många för att man redan idag ska kunna känna "smaken" av en verklig internationell gemenskap. Någonstans mellan 100 000 och några miljoner kan kommunicera på esperanto, beroende på hur man räknar. Men de är tillräckligt många och tillräckligt jämnt fördelade över planeten för att utgöra en växande internationell kultur. En karta över det esperantotalande området skulle bli en världskarta – och det är ju själva poängen.

Fler frågor och svar finns på Esperantoförbundets hemsida www.esperanto.se Klicka på "Andra texter".



La kurso dum la unua semajnfino de marto estis tre sukcesa. 9 partoprenanoj en la sabato, 6 en la dimanĉo. Kim J. Henriksen entuziasmigis la gelernantojn kaj laŭ la demandaro post la kurso la partoprenantoj estis tre kontentaj pri la kursarango. Jam post 10 horoj oni komencis konversacii.

Ni decidis daŭrigi en la 27-a de marto. Ni tiam invitos ankaŭ novajn gelernantojn kiuj posedas la fundamentan scion pri la lingvo. Aliĝo al sten@agado.net. Kosto 50 kronoj inkluzive kafon kaj buterpano.

Sten Svenonius

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

Marto 2011 • 99-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm och Olof Pettersson

Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:

EsperantoCentro, Vikingagatan 24, 113 42

Stockholm, tel. 08-34 08 00. sveda@esperanto.se

E-post: laespero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Pingvinpress Grafiska AB

Prenumeration 2011: 200 kr.

Prenumerationsavgift för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,

Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

tel. 08-34 08 00

E-post: sveda@esperanto.se

Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Plusgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2011:

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,

Plusgiro: 578-5 **Nätsida:** www.algonet.se/~eldona

E-post: eldona@telia.com **Telefon:** 070-5850054

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

Nätsida: www.e-g.se **E-post:** egarden@esperanto.se

Telefon: 0590-309 09

Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Bellmansgatan 42, 2 tr,

754 26 UPPSALA, tel. 018-24 43 01

e-post: laespero@esperanto.se

	<i>Stoppdatum</i>	<i>Utkommer senast</i>
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5-6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

NI PREZENTAS

Linus Ganman



Kie vi naskiĝis?

Mi naskiĝis en Östersund.

Kie vi loĝas?

Mi loĝas en Rinkeby.

Pri kio vi laboras?

Mi dum dek jaroj ĝis 2010 laboris kiel monitoranto de amaskomunikiloj, sed ĝuste nun mi estas praktike senlabora. Mi kelkfoje laboras kiel tradukisto, sed nun estas vere malfacile trovi daŭrajn postenojn.

Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?

Mi multe okupas pri lingvoj entute, ne nur pri Esperanto. Tiuj kiuj konas min delonge pli kredible dirus ke mi estas spertulo pri la rusa. Mi ankaŭ ŝatas vojaĝi kaj kanti. Mi kantas en ĥoro kaj ludas la pianon, la gitaron kaj la ukulelon. Post sen-sukcesa provo fariĝi vegetarano mi komencis profunde studi la fakon de nutrado kaj nuntempe mi estas konatulo inter svedoj kiuj sekvas dieton kun malalta enhavo de karbonhidratoj, t.n. LCHF.

Ĉu vi havas familion?

Mi havas pli aĝan fraton. Li kaj miaj gepatroj ankoraŭ loĝas en

Östersund kaj ĝia proksimeco. Antaŭ kvin jaroj mi havis amrilaton kun finnino (kies patrino parolas Esperanton), sed nun mi solulas.

De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?

Lingvoj dum tuta mia vivo estas granda ŝatokupo kaj mi jam fruvive kiel spongo absorbis ĉiuspecajn prilingvajn sciigojn. Mi frue komprenis ke en nia mondo troviĝas multaj lingvoj kaj sekve ankaŭ multaj baroj inter ni. Mi ne memoras kie kaj kiam mi unuafoje aŭdis pri Esperanto, sed mi klare memoras ke mi unu fojon kiel eta infano rakontis al miaj gepatroj ke mi eksciis pri internacia lingvo kiu nomiĝas Esperanto, kaj ke se oni sukcesus lerni ĝin, oni povus paroli kun ĉiuj homoj en la mondo! Mi tamen komencis lerni Esperanton nur lastjare ĉar mi senlaboriĝis kaj bezonis ion por fari dum mi serĉadis novan laboron.

Ĉu vi havas aŭ havis iujn taskojn en la Esperanto-movado?

Mi nun estas la sekretario de la Stokholma Esperanto-klubo. Ĉar mi nun freneze serĉas novan laboron, mi tamen bedaŭrinde ne povas pasigi tiom da tempo en Esperantujo kiel mi volus.

Ĉu vi havas iun favoritan libron?

Inter esperantlingvaj libroj ne, sed al mi plaĉas la rakontoj de Anton Ĉehov kaj la libroj de la norvegino Herbjørg Wassmo kaj la dano Peter Høeg.

Ĉu ekzistas aliaj interesaj pri vi?

Mi ŝatas arbarajn promenojn, ujutnaj hejmajn vesperojn kaj estas amiko de sapo kaj akvo.

Intervjuis: Leif Nordenstorm

VORTOJ DE LA REDAKTORO

"Ju fler kockar..?" Detta nummer av La Espero är det andra då vi – jag och Leif – samarbetat lite mer praktiskt kring innehåll, layout och korrektur. Vi är förstås tacksamma för alla medhjälpare korrekturläsare som påtalar såväl sakfel som språkfel och saknade övertecknade bokstäver, men hoppas på sikt att kunna etablera rutiner för denna nya arbetsform, med ett mer enhetligt utseende som resultat!

Olof Pettersson

Proksimiĝas la kongreso

La sveda Esperanto-kongreso en Stockholm, 13–15 majo 2011, okazos en du lokoj: en la vendred-vespero en Esperanto-Centro, kaj en la sabato kaj dimanĉo en lernejo. Krome estos sabata vespermanĝo en restoracio.

La lernejo

La lernejo Cybergymnasiet Odenplan Söder situas en la proksimeco de placo Odenplan, ĉe Norrtullsgatan 6. Ĝi estas mo-



La eniro de Cybergymnasiet. Foto: Olof Pettersson.

terna privata lernejo, kaj tute ne aspektas kiel lernejo, ankaŭ ne ĉe la strato. Oni eniras tra oficeja pordo, kaj la lernejo estas en la teretaĝo. La lokaloj similas al moderna oficejo kun grandaj kunsidejoj aŭ kursejoj, kaj la koridoro havas seĝojn kaj tablojn por facila kunestado kaj interparolo aŭ studado. Por la lunĉo oni uzas la manĝejon.

La kongreso disponas pri du bone ekipitaj klasĉambroj, el kiuj

unu estas iom pli granda ol ordinara klasĉambro.

Esperanto-Centro

Multaj membroj jam vizitis Esperanto-Centron, kiu troviĝas en Vikingagatan 24, je mallonga promeno el subtera stacio (*tunnelbana*) S:t Eriksplan, aŭ el loka trajno (*pendeltåg*) Karlberg. En la vendreda vespero estos ebleco partopreni mallongan kurson pri terminoj de jarkunveno en esperanto, aŭ preni tason da kafo kaj rigardi ĉu aĉeti libron. La ejo estas malgranda, kaj ne ĉiuj povos esti samtempe en ĝi. En la programo estas notitaj horoj por la kurseto kaj horoj por kafrinkado.

Proksime de Esperanto-Centro troviĝas multaj malgrandaj manĝejoj, kun proponoj pri salato, pico, pasto, supo, tradiciaj manĝoj. En vendreda vespero vi trovos malmultekostajn ejojn je Vikingagatan 16, Norrbackagatan 30, Rörstrandsgatan 23, Tomtebogatan 27 kaj Vikingagatan 7.

Turkiska salongen

En la sabata vespero estos manĝo en Turkiska salongen, kiu situas je dekminuta promeno el Odenplan, je Wallingatan. La kongresanoj iros kune al la enirejo, por kiu necesos ŝlosilo, kiun helpanto kunportos. La salono estas en la tria etaĝo, atingebla per lifto aŭ ŝtuparo. La salono apartenas al Citykonditoriet, kiu siavice apartenas al Citykyrkan. La turka salono havas longan historion ekde la jaro 1912, kiam ĝi estis festlokalto de Fenixpalatset, kaj en ĝi okazis prezentoj de tiamaj famaj artistoj. Poste la ejo estis parto de la kuirlernejo Margaretaskolan, kaj nun ĝi do estas ĉambro por festaj komunaj manĝoj.

Prelegoj

La ĉefa prelego dum la kongreso estos prezento en la sabato antaŭtagmeze, de Katalin Kováts pri esperantisto Tiberio Morariu, kiu naskiĝis antaŭ 110 jaroj en Rumanio, kaj vivis dum granda parto de sia vivo en Svedio. Aliaj prelegoj estos en la antaŭtagmezo de la dimanĉo, aliaj ol anoncote pro ŝanĝo de la programo, sed oni preparas interesajn prezentojn.

Jarkunvenoj kaj diskutoj

Dum la kongreso okazos pluraj jarkunvenoj kaj diskutoj, ĉefe en la sabato posttagmeze, sed ankaŭ je aliaj horoj. En la jarkunveno de Sveda Esperanto-Federacio estos propono pri ŝanĝo de la statuto. Post la formala fino de la kongreso, en la posttagmezo de la dimanĉo, estos ebleco resti por plu-diskuti pri aktualaj temoj.

Ulla Luin

Aliaj informoj pri la lernejo svedlingve troviĝas ĉe www.cybergymnasiet.se/stockholm

Svedlingvaj informoj pri la turka salono troviĝas je citykonditoriet.com/historia2.html.



FONDER

Svenska Esperantoförbundet för-valtar en del fonder. Här är en kort sammanställning. Mer information kan lämnas av styrelsen.

NEK-fonden

Fonden är uppkallad efter Nils Erik Kristofersson. Syftet är "att via utdelning av pengar bidra till kunskap om och insikter i språket Esperanto och i världen"

Pengar kan användas till att stödja informationsverksamhet och att främja språkundervisningen. Egen lokal skall inte ses som information. Pengar skall inte heller användas av enskilda personer för att delta i kurser, bevista möten etc." Fram till och med år 2022 får inte fondens kapital röras utan endast fondens avkastning kan användas.

Olle Olssons minnesfond

Svenska Esperanto-Förbundet (SEF) förvaltar fonden, vars främsta syfte, är att genom stipendier och andra bidrag stödja dels enskilda esperantister, lärare och andra kultur-arbetare inom ramen för vidare-utbildning och/eller tillämpning av esperanto, dels esperantogrupper eller -klubbar för genomförande av projekt som i påtaglig grad förväntas främja språkets och/eller esperantokulturens spridning och utveckling.

Stipendier ges därvid i första hand som bidrag till att bestrida kostnader för deltagande i kurser, utbildningsprogram, konferenser, kulturfestivaler och liknande där esperanto är arbets- och umgängesspråk; att leda kurser samt förnya och utveckla kursverksamheten; stöd till enskild person för litterär och/eller annan kulturell verksamhet som direkt eller indirekt kan anses främja esperantoidén eller i övrigt bidra till mellanfolklig förståelse och kulturutbyte.

Utvecklings-fonden

Fonden disponeras av SEF:s styrelse att användas under en tidsrymd på ca 20 år. Fondens främsta inriktning är att genom kursverksamhet och reklam/informationsmaterial stödja sådana aktiviteter som resulterar i att medlemsantalet ökar.

TRA LA LANDO

Svenska är 28:e språket

Svenska är det 28:e språket, när läroboken "Esperanto direkt" av Stano Marček kommer ut i svensk utgåva i sommar.

Originalen är på esperanto och kom ut år 2006, och därefter har utgåvor på olika språk kommit till. Boken har 114 sidor, och innehåller tydliga teckningar, texter, ordlistor, uttalsregler och grammatik i var och en av de 22 lektionerna. Teckningarna och texterna är samma i alla utgåvorna, medan ordlistorna och de korta grammatiska förklaringarna är översatta, liksom ett förord. Teckningarna vänder sig till ungdomar, och boken är användbar både i grupp och i självstudier oberoende av ålder.

Den svenska utgåvan är översatt av Karl-Gustaf Gustafsson, och språklig granskning är gjord av Birgitta Anevik. Teckningarna i alla utgåvorna är gjorda av Linda Marčeková. I Sverige ges boken ut i samarbete mellan författarens slovakiska förlag och det svenska Esperantoförbundet (Eldona Societo Esperanto). Leverans av exemplaren väntas ske i samband med kongressen i Köpenhamn, och Esperantoförbundet kommer att erbjuda medlemmar att hämta ut exemplar under kongressen för att förenkla transporter.

Ny sommarkurs på Visingsö

Den gångna sommarens kurs i esperanto på Visingsö blev väldigt uppskattad. I sommar ordnar Svenska Esperanto Institutet, återigen i samarbete med Braheskolan, en ny kurs med samma upplägg, alltså tre nivåer: för nybörjare, för fortsättare i två nivåer. Kurserna omfattar undervisning, utflykter, trevlig samvaro, boende och god mat. Tid: söndag 19 juni t.o.m. torsdag 23 juni 2011.

För ytterligare upplysningar och anmälan: Braheskolan, www.braheskolan.se

Progresintoj vendrede

La Espero 2011-1 raportis ke Arild Matsson gvidas kurson por komencantoj en Gotenburgo. Krom tiu kurso ekzistas ankaŭ la "vendreda grupo", kiu konsistas el progresintoj, kiuj volas pliperfektigi la lingvon. Ĝin gvidas Ralf Jalming.

Membroletero de Gotenburgo



Märtha-stipendio

SEJU delar varje år ut Märtha Andréassons stipendium. Detta stipendium är ett bidrag till kostnaderna för en resa till ett esperantoarrangemang. I år är summan 2100 kronor.

Sök stipendiet senast 31 mars hos cmasak@gmail.com



Rondo Familia

Rondo familia estas fondita en 1994, la Internacia Jaro de Familio, por ligi esperantistajn familiojn. Registras familiojn kun aŭ sen infanoj, sendepende de ilia movada engaĝiĝo. Por enskribiĝi, oni anoncu sin ĉe la CO de UEA, www.uea.org
Organo: Familia Esperanto (FE), bulteno por kaj pri esperantlingvaj familioj (ekde 2007 rete). La revuo estas elŝutebla ĉe: http://www.uea.org/rondo_familia/index.html



Esperanto Internationell kurs 10–17 juli 2011

För Dig världsmedborgare som har en demokratisk grundsyn även på internationella frågor. Esperanto vidgar dina vyer och förståelsen för livet på vår planet.

En kurs för dig som:
ser jordens språkliga och kulturella mångfald som en tillgång för mänskligheten
vill att nationella särarter får bestå och utvecklas i fredlig samexistens
vill skaffa dig en direktkontakt med människor i andra länder

Fördelar med att lära sig Esperanto:
ett språk som är mindre svårt att lära sig än traditionella språk
ett språk som går att lära sig på riktigt

Språktintresserade finner:
en språklig "huvudnyckel" till alla språks gemensamma struktur

Undervisning i fyra nivåer

1. Barngrupp. Ca 6 timmars undervisning per dag under 6 dagar, med svenska och utländska lärare. Även i nybörjarkursen står det talade språket i centrum med direktmetod och erfarna lärare.
2. Nybörjare
3. Lätt konversation
4. Konversation

Fyra lärare är nu inbokade; Kristin Tytgat, Belgien; Tamás Halasz, Ungern; Carl Mäsak, Sverige; Beatrix Mehdi Strid, Sverige.

Kontakta oss så översänder vi komplett kursprogram med priser och blankett för Din/Er anmälan till årets kurs:

Esperanto-Gården
Stiftelsevägen 1
680 96 Lesjöfors
Telefon: +46 (0)590-30909
Mobil +46 (0)70-7675455
E-post: egarden@esperanto.se eller direkt till Lennart: kles@tele2.se

ANEKDOTOJ

Pensa saĝo

Kial fine de mono restas tiom multe da monato?

Belega ujo

Kruko estas en sia oficejo. Intertempe agento de asekura kompanio vizitas lian hejmon esperante varbi novan klienton. Jozefino enirigas la vizitanton en la sidoĉambron.

La asekuristo ekvidas belegan ujon sur la kamenbreto.

Agento: Sinjorino, vi sendube konservas ion valoregan en ĝi.

Jozefino: La cindroj de mia edzo.

Agento embarasite: Ho! pardonu min! Mi ne sciis, ke via edzo forpasis!

Jozefino: Li tute ne mortis. Li nur ne emas irserĉi cindrujon, kiam li ekfumus.

Kverelo kaj repaciĝo

Patrino:

- Trankviliĝu, filino! Sciuj, ke ĉiuj ofte kverelas, poste oni paciĝas kaj ĉio komenciĝas denove.

- Mi scias, panjo. Sed diru, kion fari al la kadavro?

Tro varma

Kruko al sia ĉefo, S-ro. Sklavig: Estas ĉi tie tro varme, ĉefo! Ni bezonas klimatizadon.

Mi kredas ke mi mortos.

S-ro. Sklavig: Vi ne mortos. Homoj travivis dum miloj da jaroj sen klimatizado.


Kruko: Kaj kiel estas ĉiuj el tiuj homoj nun? Mortintaj, ĉiuj el tiuj, tiel ili estas!

Vendarto

Komercisto instruas novdungitan vendiston:

- Se venos kliento kaj demandas "Kiom kostas okulvitroj", vi diru "tri mil". Se li ne tremos, diru "por la kadro". Se li denove ne tremos, diru "kaj tri mil por la vitroj". Se li denove ne tremos, diru "por ĉiu"!

Ny lärobok i
esperanto:
"Esperanto direkt"
- kommer i sommar!



Medlemmar och klubbar i Esperantoförbundet kan hämta de första exemplaren under kongressen i Köpenhamn, där boken levereras från det slovakiska tryckeriet.

Paket om 3 exemplar, som tillsammans väger ett kilo, lämnas ut till svenska kongressdeltagare under kongressdagarna i Köpenhamn.

Betala in i förväg, senast 30 juni 2011, till Esperantoförlagets plusgiro 578-5. Skriv avsändare på talongen, och ange "Lärobok".

Pris för förhandsbetalda exemplar som lämnas ut vid kongressen i Köpenhamn: 250 kr för ett paket om 3 exemplar.

Det går bra att beställa flera paket om vardera 3 exemplar.

Bokens ordinarie pris till medlemmar beräknas bli 110 kr plus porto per exemplar, eller lite högre vid köp i bokhandel eller hos internetbokhandel. Vanliga beställningar kan preliminärt börja expedieras under senare delen av augusti 2011.

Eldona Societo Esperanto
Esperantoförlaget
Retadreso: eldona@telia.com
Telefon: 070-5850054

Finiĝis sendoj de Pola radio

La pli ol 50-jara historio de la Esperanto-redakcio de Pola Radio estas finita. La lasta elsendo estis publikigita en la reto la 31-an de januaro 2011, kaj pliaj elsendoj ne okazos. La estraro de Pola Radio decidis, ke la sola dungito de la Esperanto-redakcio, Gabriela Kosiarska, ekde nun havu aliajn taskojn.

Ekde majo pasintjare la Esperanto-elsendoj estis produktataj grandparte per volontulaj fortoj, trifoje semajne.

www.liberafolio.org

En prelegejo en Strasburgo

La fako pri interpretado de la Strasburga universitato en Francio jam de 2007 havas regulajn kontaktojn kun esperantistoj. Komence esperantistaj interpretistoj aĉetis trejnadon por si mem, poste la kontaktoj evoluis, kaj la esperantisto Cyrille Hurstel estis invitita en la ĵurion kiu akceptas novajn studentojn, ĉar li proponis novajn ideojn por pritaksi la kvaliton de la interpretado. Komence la esperantistoj renkontis primokojn, sed antaŭ kelkaj semajnoj la universitato kaj lokaj esperantistoj unufoje kunlaboris por aranĝi rektan interpretadon de prelego el la angla al Esperanto. Eble deko da homoj en la mondo nuntempe kapablas profesinivele interpreti al kaj el Esperanto, supozas Cyrille Hurstel.

www.liberafolio.org

Aŭtomata tradukilo

Aperis aŭtomata tradukilo el la franca al Esperanto, bazita sur la libera programaro Apertium. Apertium estas rimedaro por konstrui aŭtomatajn tradukilojn, per kiu jam funkcias

tradukiloj el la kataluna, hispana kaj angla al Esperanto kaj de Esperanto al la angla.

Ĉiujn menciitajn tradukilojn eblas uzi ĉe la adreso apertium.saluton.dk. Entute per Apertium funkcias ĝis nun 42 tradukiloj.

www.liberafolio.org

Lyssna på nätet

På www.podkastaro.org hittar du länkar till många olika radioutsändningar och podcasts på esperanto, som du kan lyssna på via Internet.

Ekspreso

Seminario en Hubei

La 16-a Seminario de la Hubei-a Esperanto-Asocio okazis de la 18-a ĝis la 23-a de aprilo, 2011, en Wuhan, ĉefurbo de Hubei-provinco. La seminaria temo "Ĉina Saĝo" tuŝis plurajn flankojn, kiaj ĉina kulturo, literaturo, historio kaj socio. IEK-delegacio el pli ol 20 personoj el 7 landoj partoprenis en la unusemajna seminario.

La enhavo de la seminario estas varia: prelegoj de ĉinaj kaj alilandaj gastoj, paroliga Esperanto-kurso, kvar duontagaj ekskursoj, pentrado, kaligrafado, nacia muzikado, teoceremonio, filatelado kaj aliaj aktivadoj por vespero...

esperanto.china.org.cn

Finna eldono de sveda libro

La svedlingva libro "Doktor Zamenhof och det internationella språket" de Leif Nordenstorm kaj Christer Lörnemark nun aperis en la finna.

Post la aperigo de la sveda libro dume aperis la novaj verkoj de Korĵenkov pri Zamenhof. Tial en la finna eldono aperas ankaŭ kelaj aldonaj tekstoj de Korĵenkov kaj cetere kelaj Centraj tekstoj de Zamenhof

mem kaj informoj pri la finna Esperanto-movado. La libro aperis dum la vintraj tagoj de EAF en proksima semajnfino en Tampere (Tammerfors).

Tuomo Grundström

Pri Erasmo en malferma tago

Ĉi-jare pasas 500 jaroj de post la apero de Laŭdo de l'stulteco, per kiu la granda pensulo Erasmo de Roterdamo (1466-1536) en satira formo atakis ĉiajn antaŭjuĝojn kaj superstiĉojn. "Erasmo estas la plej granda filo de Roterdamo, sed antaŭ ĉio li estas la plej elstara figuro en la historio de humanismo kaj ĝuste tial ni esperantistoj devas lin koni", skribis la recenzanto de la Esperanta traduko de lia ĉefverko en la revuo Esperanto. Sekve la 34-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA omaĝos la Erasmo-jubileon per du prelegoj. D-ino Vera Barandovská-Frank faros ĝeneralan enkondukon al la vivo kaj verkaro de Erasmo, kaj Gerrit Berveling prelegos pri Laŭdo de l'stulteco, kiun li esperantigis el la latina originalo. La traduko aperis en 1988 okaze de la 73-a UK en Roterdamo.

La 34-a Malferma Tago okazos sabaton, la 14-an de majo. Krom la du prelegoj pri Erasmo kaj lia klasikaĵo, en la programo estos ankaŭ aliaj prelegoj, libro prezentoj kaj filmoj. La vizitantoj povos profiti de rabatoj en la libroservo kaj gajni esperantaĵojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La programo daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo.

UEA

LINGVO

Interjekcioj

Interjekcioj estas vortospeco, kiu per si mem sola esperimas tutan ideon pri sento, alvoko k.t.p. Jen la ĉefaj Esperantaj interjekcioj (kun iliaj plej kutimaj uzo-cirkonstancoj):

aĉ malkontento
a ha (aha) ekrimarko de io
aĥ forta miro, bedaŭro
aj (aŭ) sufero
ba nekredemo
be konfuziĝo
bis por aprobi kaj peti ripeton
brr frostiĝo, abomeno
ĉit por silentigi aŭ mallaŭtigi
e he (ehe) ekkompreno
ek alvoko al komenco
ej dubeto, milda malaprobato
fi naŭzo, mallaŭdo
for forpelo
fu laciĝo
ha ekmiro
ha ha rido, ironio
ha lo telefona alvoko
he alvoko de atento
hej kuraĝigo
hi hi nerva aŭknabina rido hm
dubo, pripensemo
ho viveco de sento
ho(-)la (hoj) (maristeca) alvoko de atento
hop salto
hot por antaŭenigi beston
hu ektimo, tediĝo
huj sufero
hura viva ĝojo aŭ aprobo
huŝ por timigi beston
mm dubo, pripensemo
nu koncedo, konsento, plifortigo de esprimivo
o ho (oho) surprizo
oj sufero, bedaŭro
o keĵ "en ordo", "bone"
pa, pa senzorgeco
pum imito de falego
rap rap instigo al rapidigo
stop haltigo
ŝŝ por silentigi aŭ mallaŭtigi
ts por silentigi aŭ mallaŭtigi
ta, ta, ta imito de babilado
tju por timigi beston
uf malstreĉiĝo
ve bedaŭro

Pliajn interjekciojn oni povas trovi ekzemple en Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto kaj en Plena Analiza Gramatiko de Esperanto. La supraj estas elektitaj parte kun helpo de verda-lando.over-blog.net

MOVADO

Ny version av stadgeförslag

En ny, tredje version av motionen om stadgeändring är inlämnad till Esperantoförbundets styrelse den 4 mars, av Ulla Luin. Den nya versionen ersätter de två tidigare, som är daterade i december 2010 och februari 2011. Den tredje versionen har kommit till efter flera samtal med medlemmar.

Grundorsaken till motionen om stadgeändring är fortfarande behovet att alla medlemmar ska ha rösträtt vid Esperantoförbundets årsmöte. En sådan ändring kräver ett tjugotal mindre följdändringar. I den nya versionen av motionen föreslås att klubbarnas rösträtt också behålls. För en sådan konstruktion krävs ytterligare några följdändringar.

Praktiskt innebär förslagen i den nya versionen att både medlemmar och ombud från klubbar kan ha rösträtt på årsmötet. Den som är ombud för en klubb kan då ha två röster, dels för klubben och dels sin egen röst. De viktigaste punkterna finns i förslagets paragraf 9.4 och 9.5.

Varje medlem

Den ena av paragraferna (9.4) gäller rösträtten för varje medlem, oberoende av om medlemmen är med i klubb eller betalar direktmedlemsavgift. För att inte hamna i en tidsödande diskussion på ett årsmöte, om vem som ska räknas som medlem, så finns förslag i texten om att medlemmen ska ha betalat medlemsavgift i god tid före årsmötet, och att medlemmen ska ha fyllt 16 år. Det är medlemmen själv som har rösträtt, och man kan inte skicka någon annan i sitt ställe.

Klubbarna

Den andra (9.5) av de två viktiga punkterna handlar om rösträtt för klubbarna, och liknar den rösträtt som finns i nuvarande stadgar, bara lite mer preciserat hur man ska räkna ut rösträtten. Det innebär att medlemmar,

som är med i en aktiv klubb, kan få lite större tyngd i sina röster, än de medlemmar som inte är med i en lokal klubb. Tanken är att härigenom just understryka vikten av lokal verksamhet, som en av grunderna för aktiviteter. Den som är ombud för en klubb kan då ha två röster, en för sig själv och en för klubben. Övriga medlemmar i klubben har bara sin egen röst.

Några räkneexempel

Det är 40 närvarande medlemmar på årsmötet, varav 30 är medlemmar i klubbar, men ingen är ombud för en klubb. Då finns det 40 röster på årsmötet.

Det är 40 närvarande medlemmar på årsmötet, varav 30 är medlemmar i klubbar, och en av klubbarna har utsett en medlem att vara ombud. Då finns det 41 röster på årsmötet, men ändå bara 40 personer. Den som är ombud får räcka upp båda händerna vid eventuell formell omröstning.

Det är 40 närvarande medlemmar på årsmötet, varav 30 är medlemmar i klubbar, och en av de större klubbarna har utsett två medlemmar att vara ombud. Då finns det 42 röster på årsmötet, men ändå bara 40 personer. De två medlemmar som är ombud får räcka upp båda händerna vid eventuell formell omröstning.

Extra möte mm


En ny paragraf är föreslagen om vad ett extra möte får besluta (9.15). Reglerna för beslut om stadgeändring är skärpta (paragraf 10).

Diskussion om förslaget

Eventuell diskussion om förslaget till stadgeändring finns i diskussionslistan på Ipernity, adress se nedan. Hela stadgeförslaget finns på en internet-sida i pdf-format, så att den som vill och har tillgång till internet kan hämta den. Medlemmar som inte har tillgång till internet, och som vill få ett exemplar på papper, kan vända sig till Ulla Luin, på den adress som finns i UEA:s årsbok under ort Tyresö. Det nya stadgeändrings-förslaget: <http://www.esperanto.se/medlem/texter>. Diskussionslista på ipernity: <http://www.ipernity.com/group/sveda/discuss/32889>

Renkontiĝo inter kulturoj

Trevor Steele. Flugi kun kakatuoj. FEL. Antverpeno 2010. 254 p. 15.60 € ĉe UEA.



Trevor Steele post sia debuo en 1987 fariĝis unu el la plej produktemaj verkistoj en Esperantio. Persone al mi plej plaĉas liaj du romanoj – La Fotoalbumo – kiuj priskribas familion kaj ties sorto en Kvinlando en nord-orienta Aŭstralio.

En "Flugi kun kakatuoj" ni reiris al la lastaj jardekoj de la 1800-aj kaj nun troviĝa en la maldense loĝata Okcidenta Aŭstralio. Renkontiĝoj aŭ pli ekzakte kolizioj inter malsamaj kulturoj estas ofta tema en romanoj. Ankaŭ en tiu ĉi. En la romano priskribas la renkontiĝo inter la britaj enmigrintoj kaj la aborigena tribo Banubi. Unue la renkontiĝo evoluas pace. Renkontiĝas juna enmigrinto Billy Dixon kaj aborigeno Jangabara. Ambaŭ iom malobeis al diversaj tabuoj en siaj respektivaj kulturoj kaj eble pro tio estas iom solecaj homoj, kiuj trovas amikecon unu ĉe la alia. Jangabara komence estas tre lernema pri la blankula kulturo kaj tre rapide fariĝas favorato de la blankuloj. Li lernas rajdi pli bone ol multaj blankuloj. Li ankaŭ lernas uzi pafilon kaj interesiĝas pri geografio kaj historio de diversaj landoj. Baldaŭ tamen akriĝas la konfliktoj inter blankuloj kaj

nigruloj kaj montriĝas ke Jangabara nun elektas subteni la propran tribon. Ĉu la amikeco povas elteni tion?

La koloniismo estas grava parto de la historio de la homaro, kiu ankoraŭ estas nesufiĉe priskribita en la literaturo. Ni eŭropanoj ne sufiĉe komprenis kiel koloniismo ŝanĝis la vivkondiĉojn de multaj popoloj en la mondo kaj kiel eŭropanoj simple ne atentis la rajtojn de aliaj popoloj. Estas tre necese priskribi tiun ĉi parton de nia historio kaj per esplorado kaj per beletro. Tiu ĉi romano estas bonvena kontribuo al tio.


"Flugi kun kakatuoj" estas romano pri renkontiĝo inter kulturoj, kaj precipe pri tia renkontiĝo, pri kiu ni poste devas bedaŭri ke ĝi okazis en tia maniero, en kia ĝi vere okazis. Trevor Steele klopodas priskribi la evoluon de la okazaĵoj laŭ la vidpunkto kaj de la blankuloj kaj de la nigruloj. Mi opinias ke li sukcesis kapti tre malsamajn manierojn kompreni tion, kio okazis. Kio do okazis? La libro finiĝas per longedaŭra milito inter du kulturoj, kiu nepre finiĝis per la tuta malvenko de la indiĝena kulturo. La milit-priskribo – laŭ la recenzanto – ne estas tute sukcesa. Tio ne nepre estas kritiko kontraŭ la verkinto, sed eble simpla konstato ke bataloscenoj ne interesas min.

La lingvaĵo de la libro estas tute bona. Mi dum iom da tempo dubis ĉu vere necesas enkonduki la neologismon "nigoj" kiel slangaĵo por "nigrul(aĉ)oj", sed evidente ĝi atestas pri tio ke la britaj enmigrintoj ne volonte uzis neŭtralan vorton por la indiĝenoj sed prefere iom humiligan vorton.

La libron mi rekomentas al ĉiuj kiuj interesiĝas pri historio, pri etnoj aŭ kiuj simple volas legi bonan romanon.

Leif Nordenstorm

VIZAĜOJ Novelaro 2000-2009



Kion diras recenzintoj?

"...vere atentinda kaj liveranta adekvatan resumon de la Esperanto-literaturo 2000-2009."

Valentin Melnikov en Ondo de Esperanto

"Do - ĉerpu novajn fortojn, ideojn kaj instigojn el la novelaro *Vizaĝoj!*"

Till Dahlenburg en Literatura Foiro

"Ne surprize do, ke ĉi tiu ĝenro daŭre floras kaj proponas ĉiumonate kaj ĉiurevuvo tutan faskon da verketoj. Spuri, kolekti kaj selekti ilin estas do granda laboro. La lasta kolekto ĝis la momento en kiu mi skribas (...) estas *Vizaĝoj.*"

Carlo Minnaja en Literatura Foiro

"la redaktistoj faris ĝenerale brilan elekton (---). Nepre aĉetu *Vizaĝoj* en via loka libroservo."
Bjørn A. Bojesen en Beletro Almanako

La tutajn tekstojn de tiuj ĉi recenzoj kaj aliaj vi trovos en www.esperanto.net/literaturo

29 noveloj
179 paĝoj
200 svedaj kronoj
plus sendkostoj

Eldona Societo Esperanto
Esperantoförlaget
Retadreso: eldona@telia.com
Telefon: 070-5850054